Azonosító jel:

ÉRETTSÉGI VIZSGA • 2007. november 6.

ESZPERANTÓ NYELV

EMELT SZINTŰ ÍRÁSBELI VIZSGA

2007. november 6. 8:00

I. Olvasott szöveg értése

Időtartam: 70 perc

Pótlapok száma	
Tisztázati	
Piszkozati	

OKTATÁSI ÉS KULTURÁLIS MINISZTÉRIUM

Fontos tudnivalók

Ehhez a vizsgarészhez szótár **nem** használható!

1. La partoj de la suba rakonto miksiĝis.
Refaru la ĝustan ordon!
(0) estas ekzemplo por vi.

Bonaj konsiloj

Iam antaŭ multaj jaroj familio loĝis en arbaro de granda montaro. Patrino, patro, filino kaj filo vivis en dometo. Ili havis ĉevalon. De tempo al tempo la patrino petis la filon kaj la patron alporti manĝaĵojn. Tiam la patro kaj lia filo iris en la malproksiman urbon. Foje, kiam ili iris al la urbo, okazis la jena afero.

0. ***B***

1. _____
2. _____
3. _____
4. _____
5. _____
6. _____
7. _____
8. _____
9. _____
10. _____

A) Refoje venis maljuna saĝulo kaj diris:
✓ B) La patro sidis sur la ĉevalo, kiu portis lin al la urbo. Apud la ĉevalo iris per-piede lia filo. Baldaŭ venis maljuna viro, kiu diris al la patro:
— Ne estas bone, ke vi sidas sur la ĉevalo, kaj via filo devas iri per-piede. Kara patro, vi estas pli forta!
C) — Estas malafable, ke via patro devas iri per-piede, kaj vi mem sidas sur la ĉevalo. Kara knabo, vi estas pli juna!
D) — Estas tre malbone, ke du viroj sidas sur malforta ĉevalo. Oni devus bati vin, kaj forpreni de vi la ĉevalon!
E) La patro aŭdis la vortojn de la viro, kaj ankaŭ li sidiĝis sur la ĉevalon. Nun ili ambaŭ sidis supre.
F) — Mi ne komprenas viajn pensojn. Du viroj, kvankam ili havas ĉevalon, tamen ili iras per-piede. Ĉu ne estus pli facile, se unu sidus sur la ĉevalo?
G) Nun la patro kaj lia filo ne sciis kion diri. Ili ekridis, per la manoj prenis kaj levis la ĉevalon kaj portis ĝin…
H) Post kelkaj minutoj venis alia maljunulo, kaj diris al la filo:
I) Pro tiu konsilo la patro leviĝis, stariĝis sur la teron, kaj lasis la filon sidiĝi sur la ĉevalon.
J) Rapide ili ambaŭ leviĝis, stariĝis sur la teron, kaj iris per la propraj piedoj. La patro iris dekstre, la filo maldekstre, inter ili kuris la ĉevalo.
K) Tiam venis tria persono, kaj parolis al ili ambaŭ:

(laŭ Baza legolibro por komencantoj)

1.	2.	3.	4.	5.	6.	7.	8.	9.	10.	Max.	Elért
										10	

2. Trovu la lokon de la eltrancîtaj frazpartoj!
(0) estas ekzemplo por vi.

Esperanto signifas por mi...

Mi ne volonte informiĝis pri Esperanto en mia lernejo. Mi ja estas lingvoinstruisto kaj ne okupiĝas pri strangaj aferoj. Dum du jaroj mi kontraŭstaris al obstina varbistino, __(0)__ kaj entuziasmiĝis tiom, ke mi eklernis la lingvon.
Tio, kio interesis min estis la logika gramatiko preskaŭ sen esceptoj, __(11)__ kaj la genia vortfarado pere de afiksoj. Mi pensis, ke la lingvo povus esti bona baza lingvo kaj mi eĉ komencis ĝin instrui en vesperaj rondoj.
En 1988 mi ricevis la rajton de instruista konferenco provinstrui Esperanton dum ok semajnoj. Sed, ĉar la lernantoj je la kursfino ne volis hejmeniri, ĝi fariĝis tutsemestra, kaj ĝis nun mi jam instruis studentojn el kvardeko da landoj en tutsemestraj kursoj po 22 horoj semajne. La instruado estas tute en Esperanto, __(12)__. Multaj el miaj studintoj hodiaŭ uzas Esperanton multmaniere kaj diverslande.
Pli kaj pli mi komprenis ankaŭ la internan ideon de la lingvo. Ĝi ne agas por forbati aliajn lingvojn, __(13)__. Hodiaŭ politikistoj, instruistoj kaj pensuloj en gazetaroj serĉas la vojon al varieco, justeco kaj demokratia lingvopolitiko en la mondo, sed agas kontraŭe. Ili uzas nur unu lingvon el la 6000 de la mondo. La mankon de lingvaj kaj kulturaj variecoj hodiaŭ oni trovas en la filmindustrio. Manke de altkvalitaj konkurencoj, malmultekostaj __(14)__ tiel ke por gejunuloj tra la mondo "distra perforto" estas tute natura afero. Fakte kulpas niaj aŭtoritatoj, kiuj ne komprenas la gravecon de identeco kaj varieco. La plimulto ankoraŭ ne komprenas la ideojn de Zamenhof, __(15)__.
Mi tamen ĝojas, ke multaj lernantoj sen antaŭjuĝoj komprenas la valoron de Esperanto en nia mondo. Ekzemple, __(16)__, tri junaj lingvoinstruistoj venis kun siaj infanoj. Ili mem ne volis lerni Esperanton, sed promesis ĝentile partopreni unu tagon. Ili tiel entuziasmiĝis, ke ili restis la tutan semajnon kaj nun volas labori por Esperanto. Post kelkaj jaroj da instruado mi komprenis la propedeŭtikan valoron de Esperanto, pri kiu mi multe povus skribi, sed donas nur unu ekzemplon. Iam instruisto de la franca lingvo rimarkis, __(17)__ Li demandis: „Ĉu vi estis en Francio dum la somero?" „ Ne, sed mi komencis studi Esperanton."
Mi ofte ŝerce avertas miajn studentojn dirante, ke Esperanto estas kutimiga. Ĝi tute ŝanĝis mian vivon. Ĝi donis al mi multege da laboro, __(18)__.

(laŭ Lars Forsman, Juna Amiko, n-ro 98)

A. sed finfine mi promesis iom rigardi lernolibron
B. sed eĉ pli da plezuro kaj senco en la vivo
C. dum somera kurso ĉi-jare
D. de la vera komencanta nivelo ĝis la internacia ekzameno je la fino de la kurso
E. ke lernantino subite bonege sukcesis en la lingvolernado
F. kiu antaŭis sian tempon je pli ol cent jaroj
G. kaj senrespondecaj filmoj kaj videoj abundas en la angla lingvo
H. la vortotrezoro de multe da lingvoj
I. sed por subteni ĉies rajton uzi sian lingvon kaj kulturon

0.	11.	12.	13.	14.	15.	16.	17.	18.
A								

11.	12.	13.	14.	15.	16.	17.	18.	Max.	Elért
								8	

3. Legu la tekston kaj plenigu la tabelon!
(0) estas ekzemplo por vi.

Signifoj kaj ekesto de la nomoj de la sep Andaj landoj

VENEZUELO:
Kiam Ameriko Vespuĉio en 1499 alvenis unuafoje al tio, kio estas nuntempe Venezuelo, li trovis ĉe la marbordo indianan vilaĝon, kun kabanoj starantaj sur subakva fostaro, kio tuj memorigis lin pri la itala urbo Venecio, ĉe kio li spontanee eldiris la vorton "*Veneçuela*!" (= malgranda Venecio) kaj tiel restis ĝis hodiaŭ la belsona nomo de tiu lando.

KOLOMBIO:
La nomo Kolombio estis elpensita de Bolivaro mem honore al Kristoforo Kolumbo per la kunmeto de la itala vorto kaj familinomo *Colombo* kaj la latina finaĵo *-ia*, signifanta 'publika aĵo de' aŭ respubliko > Kolombio (= Respubliko de Kolumbo aŭ Kolumba Respubliko).

EKVADORO:
Ĝi nomiĝas tiel, ĉar ĝi estas trairata de tiu imaga ronda linio laŭiranta la 'talion' de nia terglobo, nomata ekvatoro; vorto kiu siavice devenas de la latina (*aequare* > *aequator*) kaj signifas la egaliganto (= la egaliganta cirklo).

PERUO:
La vorto Peruo jam estis ofte elbuŝigita de la hispanoj antaŭ ilia unua renkonto kun la Inkaa kulturo. En 1523 la Vaska navigisto *Paskŭal de Andagoja*, surtere trairinte Panamon de la Atlantika ĝis la Pacifika marbordo, alvenis al la Golfo Sankta Mikaelo, kie li kaj siaj akompanantoj renkontis amikecan tribon kaj tre amikiĝis kun la tribestro nomata *Viruo*, kiu forte kaj favore impresis ilin. Ili rakontis, ke iam la ŝipo de *Andagoja* renversiĝis kaj li preskaŭ dronis, sed estis iel savita de *Viruo* mem, kiu estis nekredeble atleta naĝanto.
Tiel ofte ili paroladis pri tiu neforgesebla tribestro, ke iom post iom la nomo mem laŭgrade aliformiĝis de *Viruo* al *Biruo* kaj al *Piruo* por finfine fariĝi Peruo.

BOLIVIO:
Kelkajn tagojn antaŭ la 6-a de aŭgusto 1825, *Antonio José de Sucre* proponis por tiu lando, kiu ĝis antaŭ nelonge nomiĝis Alta Peruo, la nomon Bolivio signifanta 'respublikon de Bolivaro' honore al la Liberiginto, kiun li mem anstataŭis, kiel la unuan Prezidenton de tiu nova respubliko. La akcepto de lia propono estis tuja kaj preskaŭ unuanima.

ĈILIO:
Pri la origino de la nomo Ĉilio ekzistas tiom da diversaj kaj kontraŭdiraj teorioj, ke ne estis por ni facile elekti la plej kredeblan kaj logikan el ĉiuj kaj el historia, kaj el lingvistika vidpunktoj.
Kiam *Pedro de Valdivia* fondis Santjagon (la ĉefurbon de Ĉilio) en 1541, kaj la Keĉuoj, kaj la Ajmaraoj jam aludis al tio, kio nuntempe estas Ĉilio per la vorto '*chiri*', kiu en la Keĉua signifas 'malvarma'. Laŭŝajne, la Inkao *Paĉakuti*, transdonante la komandon de la ekspansia kampanjo suden de sia Imperio al sia filo *Topa* (1471), instigis lin al la konkerado de tiuj foraj ankoraŭ sennomaj teritorioj sur la altaj montoj proksime de la suda poluso, kiujn li mem estus volonte konkerinta, se ili ne estus tiel 'malvarmaj'.

ARGENTINO:
Ekde la tempoj de *Pedro de Mendoza* jam cirkuladis la onidiroj pri la ekzistado de grandaj arĝentminoj tie, kien kundukis la Arĝent-Rivero kies nomo ŝuldiĝis ĝuste al tio. La tiama arĝentavido de la konkerintoj estis tiel granda, kaj la homoj en la suda parto de la kontinento estis tiel obsedataj de tiu brileblanka nobla metalo, ke iom post iom oni aldonadis la vorton 'arĝento' al preskaŭ ĉio: la Arĝent-Maro, la Arĝent-Riveraj Provincoj. En 1776 oficialiĝis la nomo la Arĝent-Rivera Vicreĝolando por tiu teritorio.
Tamen, la nomo Argentino, derivita de la latina '*argentum*' signifanta 'la arĝenta ino' estis definitive oficialigita por la tuta lando, post pluraj fiaskaj provoj, nur la 8-an de oktobro 1860.

(laŭ http://www.geocities.com/andajondoj/jul2005/20052-revuo.htm)

		ARGENTINO	BOLIVIO	ĈILIO	EKVADORO	KOLOMBIO	PERUO	VENEZUELO
0.	*Ĝia origino estas indiana vorto.*			***x***				
19.	La origino de ĝia nomo estas indiana persona nomo.							
20-23.	Ilia nomo ne originas de nomo de iu persono.							
24-26.	La teksto diras la nomon de la persono, kiu „baptis” la landojn.							
27-28.	Ilia nomo ligiĝas al Italio.							
29-30.	Ilia nomo devenas el la 19-a jarcento.							

19.	20.	21.	22.	23.	24.	25.	26.	27.	28.	29.	30.	Max.	Elért
												12	

		maximális pontszám	elért pontszám
I. Olvasott szöveg értése	1. feladat	10	
	2. feladat	8	
	3. feladat	12	
	ÖSSZESEN	**30**	

javító tanár

Dátum: .....

	pontszáma	programba beírt pontszám
I. Olvasott szöveg értése		

javító tanár

jegyző

Dátum: ..... Dátum: .....

Megjegyzések:

1. Ha a vizsgázó a II. írásbeli vizsgarész megoldását elkezdte, akkor ez a táblázat és az aláírási rész üresen marad!
2. Ha a vizsga az I. vizsgarész teljesítése közben megszakad, illetve nem folytatódik a II. vizsgarésszel, akkor ez a táblázat és az aláírási rész kitöltendő!

Azonosító jel:

ÉRETTSÉGI VIZSGA • 2007. november 6.

ESZPERANTÓ NYELV

EMELT SZINTŰ ÍRÁSBELI VIZSGA

2007. november 6. 8:00

II. Nyelvhelyesség

Időtartam: 50 perc

Pótlapok száma	
Tisztázati	
Piszkozati	

OKTATÁSI ÉS KULTURÁLIS MINISZTÉRIUM

Fontos tudnivalók

Ehhez a vizsgarészhez szótár **nem** használható!

1. El la teksto mankas kelkaj verboj, kiujn vi trovos sube. Plenigu la tabelon! (0) estas ekzemplo por vi.

Litova urbestro __0__ la pekinan UK-n

Laŭ propono de Litova Esperanto-Asocio, la urbestro de Vilnius s-ro *Arturas ZUOKAS* __1__ al Pekino por parte esti en la 89-a Universala Kongreso de Esperanto, inviti ĉiujn kongresanojn sekvontjare al Vilnius, transpreni stafedon de UK-oj al la ĉefurbo de Litovio, kaj trakti konkretajn organizajn demandojn de la jubilea UK. La urbestron __2__ lia edzino, lia konsilantino pri internaciaj ligoj kaj la rektoro de Vilniusa universitato kun la edzino. Ili __3__ en Pekinon por lastaj tagoj de la kongreso, __4__ solenan fermon de la kongreso kaj poste __5__ diversajn aliajn programojn ne ligitajn kun Esperanto. La delegacio de Vilnius __6__ en Pekino entute ok tagojn.

(laŭ Povilas Jegorovas)
ret-info

A. akompanos
B. alvenos
C. havos
D. partoprenos
E. pasigos
F. veturos
~~G. vizitos~~

0	**1.**	**2.**	**3.**	**4.**	**5.**	**6.**
G						

1.	**2.**	**3.**	**4.**	**5.**	**6.**	**Max.**	**Elért**
						6	

2. Sube vi trovas tekston, poste demandojn pri ĝi.
Aldonu la demando-vortojn, kiuj mankas!
(0) estas ekzemplo por vi.

Malpliiĝo de Japanoj

Unuafoje post 1899 la nombro de japanaj mortintoj superis tiun de naskiĝintoj. Fine de la pasinta jaro la japana registaro anoncis, ke en 2005 la nombro de naskiĝoj estis 1 067 000 kaj la nombro de mortoj 1 077 000.
Ke tiel ŝrumpas Japanio, rezultas de pluraj faktoroj. Unue temas pri altaj viv- kaj loĝ-kostoj. Salajroj ne altiĝas, male impostoj. Tio signifas, ke multaj gepatroj malfacile povas pagi la eduko-kostojn de siaj idoj: kotizoj de infanvartejoj kaj ankaŭ de universitatoj plialtiĝas.
Alia kialo rilatas al laborhoroj. Preskaŭ du trionoj de la viroj inter la aĝoj de 30 kaj 39 jaroj revenas hejmen post la 20-a horo kaj preskaŭ unu triono eĉ post la 22-a. Virinoj inter tiuj ĉi aĝoj revenas meze iom antaŭ la 19-a horo. Tial ili ne havas tempon por infanoj.
Krome en Japanio virinoj preferas labori anstataŭ patriniĝi. Malfacile estas havi bebon kaj samtempe karieron. Alia kialo: pli ol duono de la laboristoj inter la aĝoj de 20 kaj 24 jaroj ne havas firmajn postenojn: ili malmulton perlaboras kaj estas en situacioj tre malstabilaj. Rezulte ili ne geedziĝas kaj tial, laŭ statistikoj, ne naskiĝas ĝis eble 28 000 beboj.
Prognozite estas, ke en la jaro 2050 vivos 100 milionoj da japanoj (en 2005 estis 128 milionoj), el kiuj 35 % havos pli ol 64 jarojn (en 2005, 20 %). Tamen oni ne parolu pri krizo. Japanio estas malgranda lando kun malriĉaj naturfontoj kaj japanoj tro multe laboras por teni sian ekonomie prosperan vivnivelon. Do estas tempo ŝanĝi ĉi tiun principon kaj vivi harmonie kun aliaj landoj kaj kun la naturo. Anstataŭ paroli pri krizo, oni parolu pri granda ŝanco por modele vivi en la 21-a jarcento.

(laŭ HORI Jasuo/pg MONATO)

0. <u>Kio</u> estas la nova problemo de la japana socio?

7. _____ la gepatroj ne havas tempon por infanoj?
8. _____ revenas hejmen la viroj havantaj 30-39 jarojn?
9. _____ preferas la japanaj virinoj?
10. _____ estas la rezulto de la malemo je geedziĝo?
11. _____ oni prognozas por la jaro 2050?
12. _____ da japanoj vivis en 2005?
13. _____ naturfontojn havas Japanio?
14. _____ oni sukcesas teni la nunan vivnivelon?
15. _____ estas la nuna vivnivelo de japanoj?
16. _____ oni devus vivi laŭ la aŭtoro?

7.	8.	9.	10.	11.	12.	13.	14.	15.	16.	Max.	Elért
										10	

3. El la teksto mankas prepozicioj (uzataj kiel radikoj aŭ prefiksoj), vi trovos ilin sube en alfabeta ordo. Metu ilin sur la liniojn laŭ ilia apero en la teksto!
(0) estas ekzemplo por vi.

Libera programaro

En __0__aj numeroj de MONATO (2005/7-8, 10 kaj 11) aperis spertoj pri __17__page haveblaj komputilaj programoj. __18__tempe de kelkaj aperis nova versio, tiel ke indas __19__nove raporti.
OpenOffice certe estas la plej bone __20__laborita solvo por __21__i la mikrosoftajn oficejajn programojn. Mi uzis ĝian version 1.1 por kelkaj taskoj kaj decidis __22__iri al la versio 2.0. La instalo ne kaŭzas notindajn problemojn por persono, kiu komprenas la anglan.
Mi notis diversajn plibonigojn. Eĉ ege malnovaj *WordPerfect*-dosieroj legeblas. Ĝi pli bone ol antaŭe montras prezentadojn faritajn per *PowerPoint*. Mi pleje scivolis pri la nova datenbanka parto de *OpenOffice*. La plej bezonata tasko – malfermi *Access*-dosieron – ankoraŭ bezonas iom da manipulado, sed ne plu helpprogramojn: interesa progreso. __23__foliumante la plurcentpaĝan gvidlibron de la programo, mi vidis instrukciojn, kiuj rememorigis min pri iam sekvitaj *Access*-kursoj. Tio ŝajnigas, ke per *OpenOffice* eblos fari same komplikajn datenbankojn kiel per *Access*. Tamen, simpla __24__ŝanĝo de dosieroj ne eblas.

(laŭ Roland ROTSAERT
Monato)

anstataŭ ~~antaŭ~~ de dum el inter sen tra trans

0. antaŭ

17. _____

18. _____

19. _____

20. _____

21. _____

22. _____

23. _____

24. _____

17.	18.	19.	20.	21.	22.	23.	24.	Max.	Elért
								8	

4. El la teksto mankas sufiksoj. Skribu ilin al la listo!
(0) estas ekzemplo por vi.

Simpozio de Universala Esperanto-Asocio

UEA organizos simpozion pri la lingvaj problemoj kaj pri la signifo de la Esperanto-renkont__0__oj tra la historio de Esperanto. Tiu simpozio estos esper__25__e fonto por novaj esploroj pri la historio de Esperanto, pri la nask__26__o kaj evoluo de „movado", tra la renkont__0__oj, kaj aparte tra la Universalaj Kongresoj, pri la rolo de Esperanto estinte kaj estonte en la monda lingvo-pejzaĝo. Universalaj Kongresoj estas esplor__27__a fenomeno, kiel fundamenta elemento en la kreo kaj disvolvo de la Esperanta parolkomun__28__o. Prelegos elstaraj fak__29__oj pri la temo: D-ro *Ulrich Lins* (konata histori__30__o de la movado), P-ro *Roland Breton* (franca profesoro pri geografio de la lingvoj), P-ro *Jean-Claude Lescure* (kiu ĵus verkis libron pri la historio de Esperanto), *Ziko M. Sikosek* (kiu verkas pri la historio de la universalaj kongresoj). La simpozio okazos en Esperanto kaj en la franca.

(laŭ Ret-Info)

0. *iĝ*_____

25. _____

26. _____

27. _____

28. _____

29. _____

30. _____

25.	26.	27.	28.	29.	30.	Max.	Elért
						6	

		maximális pontszám	elért pontszám
II. Nyelvhelyesség	1. feladat	6	
	2. feladat	10	
	3. feladat	8	
	4. feladat	6	
	ÖSSZESEN	**30**	

javító tanár

Dátum: .....

	pontszáma	programba beírt pontszám
I. Olvasott szöveg értése		
II. Nyelvhelyesség		

javító tanár

jegyző

Dátum: ..... Dátum: .....

Megjegyzések:

1. Ha a vizsgázó a III. írásbeli vizsgarész megoldását elkezdte, akkor ez a táblázat és az aláírási rész üresen marad!
2. Ha a vizsga a II. vizsgarész teljesítése közben megszakad, illetve nem folytatódik a III. vizsgarésszel, akkor ez a táblázat és az aláírási rész kitöltendő!

Azonosító jel:

ÉRETTSÉGI VIZSGA • 2007. november 6.

ESZPERANTÓ NYELV

EMELT SZINTŰ ÍRÁSBELI VIZSGA

2007. november 6. 8:00

III. Hallott szöveg értése

Időtartam: 30 perc

Pótlapok száma	
Tisztázati	
Piszkozati	

OKTATÁSI ÉS KULTURÁLIS MINISZTÉRIUM

Fontos tudnivalók

Ehhez a vizsgarészhez szótár **nem** használható!

A vizsgához mellékelt hanghordozó tartalmazza a vizsga teljes hanganyagát (a szükséges szünetekkel együtt).

Saluton! Nun sekvos la aŭskulta parto de la abiturienta ekzameno.
Vi aŭdos ĉiujn tekstojn dufoje, kaj vi devos solvi la taskojn en tiu ĉi kajereto.

- **Ĉiu tasko komenciĝos kaj finiĝos per muziko. Poste vi aŭdos la instrukciojn (vi povos ilin ankaŭ legi antaŭ ĉiu tasko).**
- **Post tio vi havos tempon legi la tutan taskon.**
- **Tiam vi aŭdos la tekston la unuan fojon.**
- **Denove sekvos silento.**
- **Poste vi aŭdos la tekston la duan fojon.**
- **Fine vi havos tempon kontroli viajn respondojn.**

La tuta ekzameno daŭros 30 minutojn. Bonan laboron!

1. Vi aŭdos pri katakomboj de la urbo Odeso.
Aŭskultu la unuan parton de la teksto kaj kompletigu la frazojn de la unua tasko!
(0) estas ekzemplo por vi.

- **Unue legu la taskon! Poste vi aŭdos la tekston dufoje.**
- **Fine vi havos tempon kontroli viajn respondojn.**

0. La malnova Odeso estas konstruita el *kalkoŝtono.*

1. La labirinto estas pli longa ol _____
2. En multaj tuneloj troviĝas nun _____
3. La minado* sub la urbo komenciĝis en _____
4. La ĉarojn, kiuj transportis la ŝtonon tiris _____
5. En la katakomboj unue ekloĝis _____
6. Poste kaŝis sin tie revoluciuloj kaj _____
7. Lernejo kaj fabrikoj funkciis en la katakombo dum _____

8-9.Ekde la 70-90-aj jaroj funkcias tie _____ kultivejo kaj

_____ pri partizanaj bataloj.

**mini: bányászni*

1.	2.	3.	4.	5.	6.	7.	8.	9.	Max.	Elért
									9	

2. Nun vi aŭdos la duan parton de la teksto.
Decidu, ĉu la subaj frazoj estas veraj (V) aŭ falsaj (F)!
(0) estas ekzemplo por vi.

- **Unue legu la taskon! Poste vi aŭdos la tekston dufoje.**
- **Fine vi havos tempon kontroli viajn respondojn.**

	V	F
0. En kelkaj partoj de la labirinto nur kvarpiede eblas trapasi.	***x***	
10. En la katakomboj estas kaŝitaj multaj trezoroj.		
11. Infanoj volonte iradas laŭ la nekonataj vojoj.		
12. Bedaŭrinde multaj infanoj vojeraras kaj mortas tie.		
13. En la katakomboj oni organizas konkursojn.		
14. Estas tie grandaj rezervujoj por la rubo de la urbo.		
15. La katakomboj estas plenaj je mikroboj.		
16. En la labirinto estas absoluta malvarmo.		
17. La vizitantoj rajtas nenion lasi subtere.		

10.	11.	12.	13.	14.	15.	16.	17.	Max.	Elért
								8	

3. Aŭskultu tekston pri la danĝeroj pro ozon-truo, kaj elektu la ĝustan respondon! Skribu la literon de la ĝusta respondo en la tabelon! (0) estas ekzemplo por vi.

- **Unue legu la taskon! Poste vi aŭdos la tekston dufoje.**
- **Fine vi havos tempon kontroli viajn respondojn.**

0. La homoj ŝmiras sin per kremo
a) por havi bele brilan haŭton
b) por protekti sin kontraŭ sunradioj
c) por pli rapide sunbruniĝi

18. La truo en la ozontavolo ekestis super
a) Eŭropo b) Aŭstrio c) Aŭstralio

19. La haŭtkancero estas plej danĝera por
a) blankhaŭtaj eŭropanoj b) brunhaŭtuloj c) ruĝhaŭtaj indianoj

20. La ozontavolo malkreskas pro gasoj
a) uzataj por hararsapoj
b) eligitaj de aŭtomobiloj
c) uzataj por hejmaj purigaĵoj

21. Post la malpermeso de tiuj gasoj
a) la ozontruo grandiĝis
b) la ozontruo malgrandiĝis
c) fariĝis pli malmultaj la haŭtkanceruloj

22. UV-B
a) helpas produkti vitaminon D
b) helpas vidi pli bone
c) estas uzata en sunumejoj

23. La malplej danĝera UV-radiado estas
a) la plej mallongonda UV-C b) la plej longonda UV-A c) la plej longonda UV-C

24. La maldikigita ozontavolo ensorbas*
a) la tutan UV-C b) grandan parton de UV-C c) nur la duonon de UV-C

** ensorbas: elnyeli*

0.	**18.**	**19.**	**20.**	**21.**	**22.**	**23.**	**24.**
b							

18.	**19.**	**20.**	**21.**	**22.**	**23.**	**24.**	**Max.**	**Elért**
							7	

4. En la lasta tasko vi aŭdos pri la japana planto *komakusa*.
Aŭskultu la tekston, kaj respondu mallonge al la sekvaj demandoj!
(0) estas ekzemplo por vi.

- **Unue legu la taskon! Poste vi aŭdos la tekston dufoje.**
- **Fine vi havos tempon kontroli viajn respondojn.**

0. Kiam grimpis la lernantoj sur la monton? *en junio*

25. Kiom alta estas la monto sur kiun ili grimpis? _____

26. Kiel ili atingis la montopinton? _____

27. Kiajn florojn havas *komakusa*? _____

28. Kian efikon ĝi havas? _____

29. Kiam oni komencis protekti ĝin? _____

30. Kion ricevis la lernantoj pro sia agado? _____

25.	26.	27.	28.	29.	30.	Max.	Elért
						6	

		maximális pontszám	elért pontszám
III. Hallott szöveg értése	1. feladat	9	
	2. feladat	8	
	3. feladat	7	
	4. feladat	6	
	ÖSSZESEN	**30**	

javító tanár

Dátum: .....

	pontszáma	programba beírt pontszám
I. Olvasott szöveg értése		
II. Nyelvhelyesség		
III. Hallott szöveg értése		

javító tanár

jegyző

Dátum: ..... Dátum: .....

Megjegyzések:

1. Ha a vizsgázó a IV. írásbeli vizsgarész megoldását elkezdte, akkor ez a táblázat és az aláírási rész üresen marad!
2. Ha a vizsga a III. vizsgarész teljesítése közben megszakad, illetve nem folytatódik a IV. vizsgarésszel, akkor ez a táblázat és az aláírási rész kitöltendő!

Azonosító jel:

ÉRETTSÉGI VIZSGA • 2007. november 6.

ESZPERANTÓ NYELV

EMELT SZINTŰ ÍRÁSBELI VIZSGA

2007. november 6. 8:00

IV. Íráskészség

Időtartam: 90 perc

Pótlapok száma	
Tisztázati	
Piszkozati	

OKTATÁSI ÉS KULTURÁLIS MINISZTÉRIUM

Fontos tudnivalók

Szótár használható ebben a vizsgarészben.

Piszkozat – a vizsgarészre fordítható idő miatt inkább vázlat – készíthető a vizsgafüzet üres oldalán, illetve külön piszkozatlap(ok)on.

A 2. feladatban a két téma közül csak az egyiket kell kidolgozni.

1.

Vi kantas/muzikas en muzika ensemblo. Vi ĵus legis la suban anoncon.

> **Koncertemuloj serĉataj por IEK kaj BET**
> Organizantoj de la 15-a Internacia Esperanto-Kongreso (IEK) kaj de Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-41), serĉas artistojn kaj muzikgrupojn kantantajn en Esperanto por la kulturaj programoj en *Riga* (Latvio).
> Dum la 15-a IEK okazos koncertoj en la urboj *Talsi, Tukums*, kaj *Riga*, kaj por la enloĝantoj kaj por la BET-anoj.
> La organizantoj ne povas garantii honorariojn, sed ili esperas povi kontribui almenaŭ parte por la repago de la vojaĝkostoj kaj senpaga gastigado se ili sukcesas trafi subvenciojn .
> Se vi povas aŭ deziras esti programita, aŭ deziras havi pli da informoj, bonvolu kontakti
> Mara Timermane mtimermane@mail.com

Via grupo decidis proponi sin al la programoj, kaj petis vin skribi al la organizantoj por

- prezenti la historion kaj la membrojn de la ensemblo
- prezenti la muzikan stilon kaj repertuaron de la ensemblo
- peti informojn pri la aranĝo: preciza dato/daŭro, kiom da koncertoj, kiomlongaj, al kia publiko ktp.
- informiĝi pri la cirkonstacoj de la restado (loĝigo, veturigo, teknika apogo ktp.)
- proponi vian kontribuon (menciu ankaŭ kelkajn kondiĉojn)

Redaktu 100-150 vortan leteron!
Skribu vian leteron sur la unuan respondfolion!

Unua respondfolio

1.	2.	3.

1.	2.	3.

1. Tartalom és szöveghossz	(5 pont)	
Szövegalkotás	(3 pont)	
Formai jegyek és hangnem	(2 pont)	
2. Szókincs, kifejezésmód	(5 pont)	
3. Nyelvhelyesség és íráskép	(5 pont)	
Az 1. feladatban elért dolgozatpont (max. 20 pont)		
Az 1. feladatban elért vizsgapont (dolgozatpont/2)	**(max.10 pont)**	

A javító tanár esetleges szöveges értékelése: ……..……..

……..…

……..…

…….

2. Elektu unu el la sekvaj temoj kaj solvu la taskon!

2. 1.

Vi decidis partopreni konkurson de via lerneja ĵurnalo.

> *NIAJ LEGANTOJ SKRIBIS...*
>
> **En nia konkurs-serio ni proponas dek temojn.**
> **La plej brilan eseon pri ĉiu temo ni aperigos.**
> **La sekva temo estas:**
> ***LA PLEJ AMINDAJ GEAVOJ***
> **Ni atendas ankaŭ vian kontribuon!**

En via eseo

- ekspliku, kial vi reagis al tiu konkursero
- prezentu mallonge la vivon de la elektita(j) persono(j)
  t.e. via patra/patrina avo aŭ avino aŭ ambaŭ (sed ne ĉiuj kvar aŭ pli!)
- priskribu liajn/ŝiajn/iliajn nunajn vivkondiĉojn
- prezentu lian/ŝian/ilian rilaton al la genepoj, precipe al vi
- klarigu, kial gravas al la tuta socio la kontaktoj de diversaj generacioj!

Skribu vian 200-250 vortan artikolon sur la duan respondfolion!

2.2.

En via lernejo estas nuntempe granda diskuto pri la eventuala (re)enkonduko de lerneja uniformo. Raportu pri tio al via kolumbia korespondamiko!

En via letero skribu pri

- la ekesto, enhavo kaj cirkonstancoj de la diskuto
- la argumentoj de tiuj, kiuj volas uniformon (reveni al tradicioj, fortigi la senton aparteni al prestiĝa lernejo, ĝi estas bela, la lernejo ne estas modparadejo ktp.)
- kontraŭargumentoj de tiuj, kiuj ne volas uniformon (esprimi sian personecon, bunta diverseco, prezo de vestoj ktp.)
- la nuna kutimo sin vesti en via lernejo
- via opinio koncerne lernejajn tradiciojn ĝenerale!

Skribu vian 200-250 vortan leteron sur la duan respondfolion!

Dua respondfolio

1.	2.	3.

1.	2.	3.

1. Tartalom és szöveghossz	(5 pont)	
Szövegalkotás	(5 pont)	
2. Szókincs, kifejezésmód	(5 pont)	
3. Nyelvhelyesség és íráskép	(5 pont)	
A 2. feladatban elért vizsgapont (max.20 pont)		

A javító tanár esetleges szöveges értékelése: ……..……..

……..…

……..…

…….

		maximális pontszám	elért pontszám
IV. Íráskészség	1. feladat	10	
	2. feladat	20	
	VIZSGAPONT ÖSSZESEN	**30**	

javító tanár

Dátum: .....

Megjegyzés:
Az 1. feladat dolgozatpontjainak vizsgapontokká való alakításának módját a Javítási-értékelési útmutató tartalmazza.

	pontszáma	programba beírt pontszám
I. Olvasott szöveg értése		
II. Nyelvhelyesség		
III. Hallott szöveg értése		
IV. Íráskészség		

javító tanár

Dátum: .....

jegyző

Dátum: .....